


# SEK-Bulteno



Nº 26; 2009 [2]

## Boletín Informativo del “Saenzpenja Esperanto-Klubo”

Publicación bilingüe fundada en noviembre de 1990 con el objetivo de informar sobre las actividades locales, nacionales e internacionales relacionadas con la lengua internacional esperanto.



*Participantes del encuentro*

## Encuentro de Esperanto

...momentos inolvidables y confraternización ★

# 2º Encuentro Centrochaqueño de Esperanto

“Una vivencia significativa”

La propuesta para realizar este **Encuentro de Esperanto** fue analizada por primera vez en diciembre de 2008 y la fecha de la realización de dicho evento fue fijada para los días de Semana Santa de 2009. Sin embargo, el tiempo transcurrió rápidamente y no fue posible organizarlo tal lo previsto y debió ser anunciado para los días 1, 2 y 3 de mayo.

Miembros de SEK, alumnos del curso de esperanto y simpatizantes del club con mucho entusiasmo se volcaron al trabajo de organizar el Encuentro: invitaciones, programa, participantes del programa y los detalles que cualquier encuentro serio requieren atención.

Muy importante fue contar con el auspicio del Centro Cultural de Idiomas “Jorge Amado”, cuya muy confortable sede se utilizó para las diversas sesiones del programa. El encuentro también contó con el auspicio de AEL, - la Liga Argentina de Esperanto- y la presencia en persona de su Presidente, la Sra. Silvia Rottenberg, de la Capital Federal.

## Saluciones al 2º Encuentro Centrochaqueño de Esperanto

**Renato Corsetti**, ex Presidente de UEA, Italia.

**Jorge Cabrera**, Secretario de Argentina E-Ligo.

**Rubén Sánchez**, Delegado de UEA en Argentina, Neuquén.

**Francisco Veuthey**, Argentina/Holanda, Róterdam.

**Daniel Palma**, Málaga, España.

**Ernesto Moreira Martín**, Rosario, Santa Fe.

**Carlos Eduardo Schmidt**, Vitória, Brasil.

**Stephania Cabovianco**, Caseros, Buenos Aires.

**Rina Saavedra**, San Miguel de Tucumán.

**Lili Samudio**, Asunción, Paraguay.

**Inés Beaumont**, Buenos Aires.

**Roberto Sartor**, Buenos Aires.

**Conrado Bondel**, El Bolsón, Río Negro.

**María Berna Morzán**, Chaco.

**Maritza Gutiérrez González**, Radio Habana Cuba, Cuba.

**Abel Weiner**, Pujato Norte, Santa Fe.

**Livia Barth Neiman**, Neuquén.

**Teresita Alaníz**, Alpa Corral, Córdoba.

**Carlos Tomás**, Alpa Corral, Córdoba.

**Alcides Wentinck**, Escuela Argentina de Esperanto, Florida, Buenos Aires.

**Rene Arce**, Córdoba.

La asistencia no contó con una masiva participación de esperantistas de otros lugares del país, quienes no viajaron por razones particulares o desalentados por las noticias sobre los casos de dengue en nuestra zona.

Sin embargo la participación fue satisfactoriamente importante. Los dos únicos programas previstos no realizados fueron: la apertura inicialmente a desarrollarse en el marco del 2º Encuentro de Lenguas Extranjeras que tuvo que suspenderse por fuerza mayor, motivos ajenos a la voluntad de los organizadores y la excursión del día domingo.

## El variado y multifacético programa

El programa del 2º Encuentro Centrochaqueño de Esperanto demostró ser abundante, rico, variado e interesante pues se desarrolló no sólo en esperanto, sino también en español y portugués. Las diversas partes consistentes en charlas, videos, juegos y canciones en esperanto, amenizaron las más de 13 horas de programación del mismo.

El viernes 1 de mayo por la tarde, un día feriado, Día del Trabajador, todo estaba listo para el inicio.

A partir de las 14:00 los participantes fueron dándose cita en el lugar y fueron recibidos con café y la más cordial bienvenida.

Las palabras de apertura estuvieron a cargo del Coordinador General, Lic. Carlos Tony Stacul. Transmitió las salu- taciones, (ver recuadro), y presentó la “Ronda de Poesías y Poemas en Esperanto” a cargo de Carolina Quintana y Analía Paz. Luego dio paso a la



*Silvia Rottenberg, la Presidente de AEL*



*Tony Stacul presenta a Carolina y Analía*



*Participando de “Juegos dramáticos de grupo” con Alicia Aranda*

presentación a cargo de la Presidente de AEL, Silvia Rottenberg con el tema “**Esperanto estas...**” basado en el DVD con ese tema. La Sra. Rottenberg relató en forma muy amena sus innumerables

experiencias relacionadas con el esperanto, tanto en nuestro país como en el Brasil, los Estados Unidos e Israel, donde siempre gracias a los esperantistas pudo disfrutar de congresos, estadias personales y gratos momentos.

El tema siguiente fue: “En búsqueda de nuevos modos de leer” a cargo de Tony Stacul y tras una breve pausa fue presentada la película “La Patro”, rodada en esperanto y subtitulada en español. Finalmente los participantes regresaron a sus hogares para reencontrarse a las 22:00 en una confitería céntrica y disfrutar de una cena de confraternización.

presentación del documental “Visita a la Oficina Central de UEA en Róterdam” y ronda de información sobre UEA, a cargo de Rubén Diaconu.

La segunda parte del programa fue presentada por el esperantista Pedro Ojeda, de la ciudad de Resistencia. Mediante una simple exposición informó sobre lo orígenes de la filosofía budista y en especial sobre la corriente “Mahayana”, puntualizando que “es posible ser budista en la actualidad, pues se trata de una filosofía de vida que responde a los cuestionamientos de la vida misma”.



*Cena de confraternización*

Nuevamente se dispuso de una pausa para el almuerzo y a partir de las 15:00 se retomó la programación, la que contaría con una notable cantidad de material en portugués.

Tras una recepción amenizada por café y facturas, Alicia Aranda guió a los participantes a través de “Juegos dramáticos de grupo”.

El sábado habría de ser un día bastante agitado, pues el extenso programa no daría lugar a pérdida de tiempo por retrasos. Sin embargo, una grata visita, pospuso por 1 hora el inicio del programa. Dos periodistas, de importantes medios locales de comunicación, se hicieron presentes para requerir información tanto para la radio FM “La Red” como para los diarios “Primera Línea” y “El Diario”. Cumplimentado todo, incluso las fotos para los periódicos, se dio inicio a la

El Lic. Tony Stacul presentó su tema: “*O mito da negritude*”, una breve reseña histórica de los prejuicios y situaciones que debieron atravesar los negros en Brasil y el continente americano.

A modo de pausa, se disfrutó de un poema y varios cuentos cortos en esperanto y se prosiguió con la presentación del DVD, “*Esperanto estas*”, doblado al portugués, elaborado recientemente por el grupo internacional “*Esperanto@Interreto*” para la difusión del esperanto en 9 idiomas nacionales.

“Las nuevas corrientes en la atención farmacéutica” estuvo a cargo de Carolina Quintana, estudiante universitaria de la carrera de Farmacia en la recientemente formada “Universidad Nacional del Chaco Austral” de Pres. R. Sáenz Peña.

Y como no debía faltar, un curso relámpago de esperanto a cargo de Rubén Diaconu según el video “Mazi en Gondolando”, ilustró a los presentes sobre las ventajas y facilidades del “Rekta Metodo” o “método directo de aprendizaje”. Este método que fomenta el “Internacia Esperanto-Instituto” de La Haya, fue iniciado en el mundo del esperanto por el sacerdote católico húngaro Andreas Cseh y es muy popular actualmente entre los profesores de esperanto quienes frecuentemente deben enseñar a alumnos de diversas nacionalidades y no es posible la traducción en sus respectivas lenguas maternas.

Como tema final, Rubén Diaconu presentó información relacionada con los Congresos Universales de Esperanto, desde el 1º Congreso en 1905 hasta el 94º a realizarse este en Bialystok, Polonia, en el año de 150º aniversario del nacimiento, en esa ciudad, del iniciador del esperanto el Dr. Lázaro L. Zamenhof.

## Clausura y conclusiones

La clausura fue muy interesante pues no sólo se entregaron los certificados de asistencia al Encuentro, sino que también se realizó un pequeño análisis

de los logros y/o resultados del programa desarrollado. Las conclusiones expresaron el beneplácito y la satisfacción de los participantes. En el recuadro (p. 6) se transcriben algunas de ellas.

Como broche de oro, siendo ya las 21:00 se disfrutó de un pequeño refrigerio y con un poco de nostalgia hubo que comenzar a despedirse uno de otros, con la esperanza de que el próximo año se volverá a realizar un Encuentro Centrochaqueño de Esperanto y sin dudas se contará con participantes esperantistas de otros puntos del país.



*Durante la pausa para refrigerio*

Algo muy importante: los miembros de SEK y los organizadores del encuentro en particular, expresan por este medio el más cordial agradecimiento a todos los participantes por su presencia y la colaboración mediante las adhesiones recibidas sin lo cual el evento no podría haberse realizado. ★

**Lic. Tony Stacul/La Redacción**  
*Fotos: Analía Paz, Raymond Charaf  
y Carolina Quintana*

## Reflexiones y conclusiones sobre el 2º Encuentro Centrochaqueño de Esperanto

Los participantes fueron invitados a definir en pocas palabras cómo vivieron el encuentro, y/o a expresar sus conclusiones sobre los resultados del mismo. Estas son algunas de las expresiones.

- “Una vivencia significativa”
- “Con el encuentro enriquecí espiritualmente”
- “La paz está en mi corazón, soy feliz de compartir con amigos”
- “Nos unió la energía las ganas de saber con el esperanto en el medio y como medio de unión”
- “La magia de compartir y la gracia del encuentro”
- “Tener un encuentro de esperanto nos da el sentido de pertenecer a una cultura de comunicación de las lenguas...”
- “Agradecido y contento, feliz por lo realizado”
- “Dankon Doktoro Zamenhof”
- “Este idioma me hace sentir que estoy en este momento conectado con todo el mundo, por la hermandad que se demuestra.”



**Galeria de fotos:** Los más interesantes momentos del encuentro son reflejados por las fotos que reproducimos en ésta y la siguiente página.





*Momentos  
imborrables se  
vivieron durante el  
2º Encuentro  
Centrochaqueño de  
Esperanto.*



# Una plaza que es orgullo para Pres. R. Sáenz Peña



*Vecinos en la inauguración del cartel (01-06-2007)*

**Pocas veces podemos decir con tanta certeza que una plaza es el orgullo de una ciudad. En este caso si. ¿Por qué?**

**P**orque en este caso se trata no solamente de una hermosa plaza sino que lleva el nombre de la lengua universal: **Esperanto**. Está ubicada en el Barrio Oro Blanco de nuestra ciudad y sin lugar a dudas su nombre en si mismo otorga a TODOS los saenzpeñenses un sentimiento muy especial.

## **Una plaza con historia**

Quizás muchos se sorprenderán al conocer la historia que acompaña a esta plaza.

En el año 1988, cuando la Comisión Organizadora del 49° Congreso Argentino de Esperanto solicitó por primera vez poner el nombre Esperanto a una calle o plaza de nuestra ciudad, el poder ejecutivo vio con beneplácito que la plaza del Oro Blanco, **que hasta ese entonces no tenía nombre**, recibiera

éste como homenaje a la trascendencia del esperanto en nuestra ciudad y en reconocimiento a las resoluciones de 1954 y 1985 de la UNESCO que recomiendan a todos los pueblos del mundo “acepten y difundan el idioma internacional esperanto” por ser el medio más neutral, eficaz e igualitario de comunicación in-

ternacional.

Estuvieron en ese tiempo trabajando en la Comisión del Congreso: Mariano Marinoff, Néstor Casanovas, Mary Carrasco, Oscar Ostojic, Francisco Veuthey y otros.

En representación del Municipio Saenzpeñense, en ese entonces a cargo del Dr. Luis Horacio Lita, el Sr. Remo Raffin estuvo presente en el acto realizado en el Barrio Oro Blanco el 20 de julio de 1989. Asistieron esperantistas locales, de nuestro país y representantes del esperanto de varias ciudades del hermano país del Brasil.

Desde ese entonces la plaza lleva el nombre ESPERANTO.

Durante los años 1990/91 se realizaron debidamente las gestiones pendientes en la Municipalidad y se obtuvo





*El representante municipal Sr Raffin  
y el Prof Veuthev (20-09-1989)*



*Argentinos y brasileños en la ceremonia de la plaza (1989)*

pudo pasar desapercibido en el mundo del esperanto. Así fue como la foto de la plaza fue incorporada al archivo mundial de monumentos sobre el esperanto y luego publicada en el libro *Monumente pri Esperanto* editado en 1997 por la Asociación Universal de Esperanto... y nuestra plaza llegó a ser conocida en todo el mundo.

Años más tarde, se realizaron remodelaciones con el fin de mejorar aun más la plaza. La placa fue sustraída por manos anónimas pero la remodelación finalizó con gran éxito. Las obras fueron inauguradas el 12 de octubre de 2001 por el Intendente Dr. Carim A.

la Resolución N° 485/91 mediante la cual, legal y formalmente, la plaza se llama *Lengua Universal Esperanto*.

En el año 1992, la Comisión Vecinal de ese entonces, presidida por el Sr. Pascual Conforti con el apoyo de la Municipalidad a cargo del Intendente Adolfo Arce, realizó considerables mejoras en la misma, realizando un gran acto el día 18 de julio. El Club Saenzpeñense de Esperanto estuvo presente e inauguró un monolito y una placa de bronce con el nombre de la plaza, acto a cargo de la Juventud Esperantista Argentina, presidida por Erica Frias. Este importante hecho no

Peche, también con la asistencia de los miembros de SEK.

Más recientemente, la Comisión Vecinal presidida por el Sr. Aníbal Blanco, consiguió y colocó el cartel indicador con el nombre, siendo inaugurado el 1 de junio de 2007.

En todos estos actos desde 1989, los miembros de SEK con mucho agrado estuvieron acompañando a los vecinos del barrio orgullosos de que el Esperanto esté representado en nuestra ciudad y la querida plaza del barrio Oro Blanco luzca cada vez más hermosa y confortable. Es por ello que los visitantes, turistas esperantistas, que



*Acompañado por vecinos, el Intendente A. Arce izó la enseña patria y la bandera del esperanto. (18-09-1992)*

“Antonio Zafra”, quienes reciben y archivan regularmente toda información relacionada con el esperanto en nuestra ciudad y en los días festivos enarbolan junto a la enseña patria también la bandera del esperanto, esa bandera que en el año 1988 con tanto amor confeccionara la abuela, doña Merka Yuquich.

Después de considerar todo lo

llegan a nuestra ciudad visitan también la Plaza Esperanto y llevan una foto tomada en tan preciado lugar.

El apoyo de SEK también se percibe a través de la constante y fluida comunicación con la Comisión Vecinal y el Centro de Jubilados y Pensionados

expuesto, como saenzpeñenses sentimos una gran satisfacción por tener en nuestra ciudad la Plaza Esperanto y podemos afirmar que así también lo sienten vecinos de la misma. ★



*Placa de bronce y monolito inaugurados el 18 de julio de 1992. Foto registrada en el libro **Monumente pri Esperanto***

# Raporto pri la 2-a Renkontiĝo de Esperanto

**E**n urbo **Presidencia Roque Sáenz Peña**, provinco Chaco, Argentino, de la 1-a ĝis la 3-a de majo okazis la **2-a Renkontiĝo de Esperanto** de centraj ĉakanaj geesperantistoj.

La aranĝo estis organizita de **Saenzpenja Esperanto-Klubo** (SEK), helpita de gelernantoj de la ĉijara E-Kurso kaj simpatiantoj de Esperanto de la urbo Tre grava estis la aŭspicio de instituto Ce. Cu. Id. (*Centro Cultural de Idiomas "Jorge Amado"*), kies komforta sidejo estis loko por okazigo de la evento. Krome, estis aŭspicio de Argentina E-Ligo kun persona ĉeesto kaj partopreno de ĝia prezidantino, Silvia Rottenberg, el Bonaero.

Dudeko da ĉeestantoj ne estis troa, kaŭze de pluraj malfacilaĵoj, epidemio de dengo, sed la plimulto de la lokaj kaj provincaj geesperantistoj sukcese partoprenis la pli ol 13 horoj da programo.

## La enhavriĉa programo.

Pluraj eroj disvolviĝis ne nur en Esperanto sed ankaŭ en la hispana kaj portugala lingvoj.

Vendredo, ekde la 14h30 la ĉeestantoj estis akceptitaj per kafo kaj dolĉaĵoj.

Je la 16h00, la kunordiganto Mag. Tony Stacul malfermis la renkontiĝon kaj legis salutvortojn de pluraj gravaj geesperantistoj, landanoj kaj eksterlandanoj.

**"Poemoj en Esperanto"** estis la unua programero fare de Analía Paz kaj Carolina Quintana.

Silvia Rottenberg prezentis la temon: **"Esperanto estas..."** ilustrante per pecoj de la filmo en DVD kaj rakontoj de siaj pluraj internaciaj spertoj dank'al Esperanto.

Tony Stacul prelegis pri **"Novaj legomanieroj"** kaj Rubén Diaconu prezentis la filmon **"La Patro"**.

Nokte la partoprenantoj renkontiĝis en restoracio por kunfratiga vespermanĝo.

Sabate la programo prokrastis ĉ. duonhoron ĉar oni ricevis viziton de ĵurnalistoj kiuj intervjuis la organizantojn per radio kaj por artikolo en provincaj ĵurnaloj.

Oni prezentis la filmon **"Vizito al la CO de UEA"** kaj sekve Pedro Ojeda prelegis pri budhismo en la nuntempo.

Post manĝopaŭzo la programo daŭrigis per **"Grupaj dramaj ludoj"** fare de Alicia Aranda. Tony Stacul prelegis portugallingve pri **"O mito da negritude"** kaj Rubén Diaconu prezentis la DVD **"Esperanto estas..."** dublita en la portugala.

Carolina Quintana, studentino pri farmacio en la ĵus starigita *"Universidad Nacional del Chaco Austral"* prelegis pri **"Novaj servosistemoj en apotekoj"**

Sekve estis prezentita eron de la kurso **Mazi en Gondolando** kiel sugesto por E-lernado per rekta-metodo.

Je la fino oni pritraktis diversajn aspektojn de la Universalaj Kongresoj, ĉefe la 94-a UK okazonta ĉijare en Bjalistoko kiel jubileo de la naskiĝjaro de L. L. Zamenhof.

Dum la fermo, krom disdono de atestiloj, la partoprenantoj, (sur papero) esprimis siajn impresojn kaj sukcesojn de la renkontiĝo. Ĉiuj kunsentis ke la evento estis ege amusa kaj kleriga. La etoso estis vere kunfratiga kaj kuraĝiga.

Oni atendas senpacience venontjaran okazigon de ĉi tia E-Renkontiĝo kun pli da ĉeestantoj, argentinanoj eĉ brazilanoj. ★

*Raportas: La Redakcio  
Fotoj sur paĝoj 4-6: Raimundo Charaf,  
Analía Paz kaj Carolina Quintana*

## Sylla Chaves forpasis

**L**a brazila verkisto kaj pedagogo Sylla Chaves (1929-2009) forpasis la 30-an de majo, nur tri tagojn antaŭ sia 80-jariĝo. Li studis juron, komunikadon, kibernetikon kaj politikan sciencon. Li laboris ĉe UN en Novjorko kaj Unesko en Parizo kaj profesoris en la Brazila Lernejo pri Publika Administrado. Chaves lernis Esperanton en la 30-jaroj kaj ekaktivis en 1946. Li estis prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo 1978-82.

En Parizo Chaves partoprenis en la Esperanta kabaredo de Raymond Schwartz. Ofta premiito en la Belartaj Konkursoj de UEA, li aperigis la poeziajn volumojn "Animo prisma" (1959) kaj "Por pli bona mondo" (1970). Chaves provizis la brazilan movadon per modernaj instruiloj: krom multaj lernokaj legolibroj, afiŝoj, aŭdvidaj materialoj, teatraĵoj kaj la volumo "100 jaroj da kantado en Esperanto" (1989), aperis de li amaso da diskoj kaj kasedoj, ĉiuj kun profesiaj muzikistoj. Li kompilis la 2100-vortan "Suplemento al la Granda vortaro Esperanto-portugala" de Ismael Gomes Braga (1989) kaj en 1991 aperis lia populara "Originala Esperanta bildvortaro". Chaves estis membro de la Akademio de Esperanto 1986-96 kaj Honora Membro de UEA ekde 1992.

*Gazetara Komunikado de UEA  
n-ro 328*

## Pli bona mondo

Mi iam vivos en pli bona mondo,  
De am' kaj justo estos plena ĝi,  
Virin' kaj viro marŝos al estonto  
Kun samaj rajtoj kaj en harmoni'

Kaj nun vi kisu, kisu min karino/karulo,  
Kaj ni forgesu pri l'mensog-soci',  
Ni kunfandiĝu en nia kor-brulo  
Laŭ la regulo de l'natura viv'

Da geedziĝoj ni plurfoje vidas  
En kiuj mono estas nur akcel'  
Fianĉoj trompaj kiuj mon-avidas  
Malpli valoras ol iu de bordel'

Kaj nun vi kisu, kisu min karino/karulo,  
Kaj ni forgesu pri l'mensog-soci'  
Ni kunfandiĝu en nia kor-brulo  
Laŭ la regulo de l'natura viv'

Fraŭlino kara vi ne perdu tempon  
En via koro ankaŭ brulu am'  
Somer' kaj vintro sekvos la printempon  
Kaj vi ekpensas, sed malfruos jam

*Sylla Chaves*



# Tamen multo okazas ankaŭ en Urugvajo

de: <[rdba@adinet.com.uy](mailto:rdba@adinet.com.uy)>

Saluton al ĉiuj kaj pardonu la malfruon de mia respondo.

Unue pro laboraj aferoj kaj poste pro iom da malsano mi estis for de la komputilo kaj tial ne kontaktis miajn gekamaradojn el Urugvajo por informi ilin pri la nuna stato de la afero. Ĝus nun mi faras tion kaj nun atendas reagon por pli taŭge respondi la demandojn ricevitaĵn.

Mi dankas al ĉiuj, kiuj respondis min, pro la intereso kaj tuja respondo.

Dum multaj jaroj UES (Urugvaja Esperanto-Societo) eltenis sin danke al malmultaj homoj, ĉefe s-roj Alberto Barrocas kaj Arisbel Luberto. Dum la jaroj 2003 kaj 2004 aliĝis al UES aliaj novaj homoj, sed ankoraŭ la nombro estis malgranda.

Dum la jaro 2004 kaj kun la helpo de UEA kaj francaj esperantistoj, ni sukcesis festi la 50an jariĝon de la montevidea deklaro de UNESKO favore al Esperanto, per partoprenado - per budo - en la Internacia Librofoiro ĉe Montevideo. Tio revivigis la movadon: kelkaj esperantistoj malmulte aktivaj alproksimiĝis por kunlabori kun la organizado de la evento, kaj ankaŭ la malmultaj tiamaj lernantoj tre aktive helpis. Tuj post la fino de la librofoiro ni organizis bazan kurson por komencantoj, kaj de tiam ĝis nun ni organizas po unu aŭ du kursojn ĉiujare, kvankam la nombro da lernantoj ĉiam estas malgranda (inter 2 kaj 10 dum la jaro). Bonŝance, kelkaj el la lernantoj finas la kursojn kaj restas en la movado.

Je la 2006a jaro, ni kreis Radio-n Aktiva-n, interreta radiostacio kiu elsendis ĉiutage kaj tuttage, kun diversaj programeroj, kelkaj en la hispana (kurso de Esperanto kun la voĉo de d-ro Marcelo Casartelli), kelkaj en Esperanto, kaj la ceteraj dulingvaj (esperanto/hispana) Dum tiu jaro ni sukcesis lui domon, kiu ĝis nun funkcias kiel sidejo de UES.

S-ino Sandra Burgues organizis en restoracio "La Vegetariana" (La Vegetarano) renkontiĝon inter vegetaranoj kaj esperantistoj por ke ĉiu grupo konu pli pri la alia.

Poste, alia membro de UES, s-ro Eduardo Trápani, kun helpo de aliaj geesperantistoj, sukcesis fini la tradukadon de la retumilo Mozilla Firefox, kaj de tiam la Esperanta versio de tiu programo fariĝis oficiala ene de Mozilla. Tio signifas ke oni povas ne simple elŝuti la programon kaj apartan arĥivon kun la traduko al E-o, sed oni povas rekti elŝuti la programon en E-o.

Radio Aktiva elsendis rekte el Brazilo la 42-an BKE, kun apogo de membroj de Radio Rio de Janeiro, danke al Fabiano Henrique kaj Givanildo Costa.

La elsendo inkluzivigis intervjuojn, dissendon de multaj prelegoj kaj eĉ agadoj ene de la infana kongreseto.

La 21-a de septembro de la 2007a jaro, Radio Aktiva aldonis podkaston version de la elsendo al la jam ekzistanta rekta ĉiutaga elsendo. En la jaro 2008a oni ĉesis la rektan elsendon ĉar la nombro de aŭskultantoj kaj la kresko de tiu ĉi nombro estis tro mal-granda, kaj ĉar la ĉefa celo -ke Esperantaj asocioj uzu la radion kiel propra rimedo por diskonigi iliajn agadojn- ne estis trafita (nur malmultaj asocioj kaj unuopuloj profitis la donitan eblecon.

Tamen, la podkasta versio daŭras ĝis hodiaŭ, kaj aldonis al la propraj programoj ankaŭ tiujn de alilandaj esperantistoj (Monda Muziko, el razilo, kaj Informoj el Pekino, el Ĉinio).

<http://radioaktiva.esperanto.org.uy>

Dum la jaro 2008a ni partoprenis diversajn intervjuojn faritaj de naciaj perondaj radiostacioj (AM kaj FM), kun la celo diskonigi Esperanton en nia lando.

Ankaŭ en la 2008a jaro ni organizis prezentadon de Esperanto en la Romantika Muzeo ĉe Montevideo, kie ni

profitis la okazon por prezenti ankaŭ la DVD-on "Esperanto estas...".

Pli malpli ĉi tiuj estis la ĉefaj punktoj de nia agado dum la lastaj jaroj.

Post malmultaj tagoj mi respondos la aliaj mesaĝoj ricevataj. Dume, mi atentos pliajn reagojn de miaj urugvajaj samideanoj, kiuj ne eksciis pli frue pri la pritraktita afero ĉar mi ne povis informi ilin antaŭe.

Dankon al ĉiuj pro la interesiĝo. Amike kaj samideane,

*Daniel Bebelacqua*  
Montevideo,  
Urugvajo

# Universala Kongreso en Bjalistoko

**Kongresa temo: "Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ"**

Preskaŭ 2000 aliĝintoj el 63 landoj

**D**e la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto okazis en Bjalistoko la 94-a Universala Kongreso de Esperanto.

Ĉi kongreso estis speciala omaĝo al la kreinto de Esperanto D-ro L. L. Zamenhof en sia Jubilea Jaro.

**Podlaĥia Vojevodio** nomiĝas unu el 16 administraj teritorioj kiuj komune formigas Pollandon. Ĝi situas nord-oriente de Pollando, en la geografia centro de Eŭropo. Meze de ĝi fluas la rivero Narev. La ĉefurbo de la regiono nomiĝas Bjalistoko. Ĝiaj atutoj estas pura naturo kun fragmentoj de la praarbaro kaj la rivero Biebrza.

La Vojevodio havas agrikulturan karakteron sed ĉiam pli gravas rolon ludas turismo.



*Afiŝo de la 94-a UK*

Preskaŭ 300-mila Bjalistoko estas la plej granda urbo de la nord-orienta parto de Pollando kaj la ĉefurbo de Podlaĥia Vojevodio. Ĝi funkcias kiel administra, ekonomia, scienca kaj kultura centro de tiu regiono, kiun oni nomas „Verdaj Pulmoj de Pollando”.

Situo de la urbo en ekologie pura kaj turisme alloga regiono, riĉa infrastrukturo de Bjalistoko igas ĝin kaj ĝian ĉirkaŭaĵon alloga por vivi, ripozi, viziti...

Por multaj alvenantoj la urbo estas tre bona elirpunkto por ekskursi tra „Verdaj Pulmoj de Pollando”, al la Arbarego de Białowieża, al la marĉoj de Biebrza, la riveroj Narew kaj la Bug, al ĉarmaj, malnovaj urbetoj kaj vilaĝoj de Podlaĥio.

Bjalistokon oni povas atingi per trajno, aŭtobuso aŭ aŭtomobilo. En la urbo troviĝas malgranda aeroporto Krywlany, uzata nur por sportaj kaj instruaj celoj. Tie povas alteriĝi kaj starti nur malgrandaj, privataj aviadiloj kaj balonoj. En la urbo kruciĝas vojoj kaj fervojoj: landaj kaj internaciaj. Ĝi troviĝas ĉe la internacia fervojo Berlino-Varsovio-Sankt Peterburgo–Moskvo. Tra ĝi pasas vojoj el okcidenta Eŭropo tra Pollando al Belorusio, Litovio, Latvio, Estonio kaj Rusio. Planata estas grava internacia vojo „Via Baltica” el Skandinavio al la suda Eŭropo. La situo proksime al la landlimoj kun: Belorusio, Litovio, Rusio kaj relative bonaj vojoj ebligas disvolvi ekonomiajn kaj kulturajn kontaktojn kun i.a landoj el orienta kaj okcidenta Eŭropo. Proksime al Bjalistoko funkcias la limpasejoj al Belorusio kaj Litovio i. a. en: Kuźnica Białostocka, Bobrowniki, Siemianówka, Czeremcha, Połowce, Ogrodniki, Trakiszki kaj Budzisko.

Bjalistoko aĝas kelkajn jarcentojn. Ĝiaj specifaj trajtoj formiĝis en la etoso de kunvivo de multaj nacioj, lingvoj, konfesoj, kulturoj, kutimoj kaj tradicioj. La urbo estis kaj estas la loko, kie renkontiĝis: poloj, belorusoj, hebreoj, litovoj, germanoj, rusoj, tataroj... Tio estis inter alie la kialo, pro kiu



*Panorama vidaĵo de Bjalistoko*

naskiĝinta ĉi-tie Ludoviko Zamenhof komencis sian laboron pri kreo de la universala lingvo Esperanto.

En Bjalistoko troviĝas kelkcent antikvaĵoj. 150 el inter ili oni enskribis en la oficialan registron de antikvaĵoj.

La lasta jardeko de la XX j.c. estis periodo de rapida evoluo de turisma infrastrukturo de la urbo.

### **La kongresejo**

Bjalistoka Politekniko estis la kongresejo. Ĝi estas altlernejo kun pli ol 13.000-oj da studentoj kaj estis fondita en la jaro 1949, kiel la Alta Inĝiniera Lernejo. Nuntempe ĝi gvidas 8 fakojn. Du el ili troviĝas en aliaj urboj. La plej granda nombro de la studsalonoj kaj fakoj situas ĉe la strato Wiejska. La altlernejo kunlaboras kun diversaj partneroj en Pollando kaj eksterlande. En la jaro 2008 Bjalistoka Politekniko estis elektita kiel la plej bona alta lernejo en la Podlaĥia Vojevodio. ★

# ANONCOJ

## Forpaso

Ni bedaŭras la forpason de nia kara samideano Jesé Drucker (1922-2008) en urbo Catamarca. Esperantisto de multjaroj, s-ro Drucker vizitis nin kaj daŭre estis en kontakto kun SEK.

## Kurso

La 11-an de aŭgusto de 2009 finiĝis la ĉijara Progresiga E-kurso de Esperanto. Ĝi okazis ĉiumarde ekde la 7-a de aprilo en la sidejo de Ce. Cu. Id. *Centro Cultural de Idiomas "Jorge Amado"*.

## 20-a Datreveno

La fondiĝo de SEK estis de 21-a de aŭgusto de 1989. Okaze de ĝia 20-a Datreveno ni salutas ĉiujn membrojn.

## SEK-Bulteno en la reto

Nia bulteno estas dissendita al la retaj adresoj de esperantistoj en pli ol 30 landoj. Tamen ĝi ankaŭ estas legebla kaj elŝutebla ĉe:

[www.gazetejo.org](http://www.gazetejo.org)

## Nova KD

*Bizara Lando*, estas la unua KD de Carlos Devizia farita en Esperanto. Ĝi enhavas dek kantaĵojn kaj estas eksperimenta albumo. Tie, oni trovos sonfontojn el diversaj lokoj el la mondo. En tiu ĉi KD partoprenas, krome de Carlos Devizia, kelkaj muzikistoj kiel Fabio Causin kiu ludas dolĉan fluton en "Libereca Kantaĵo", Salvador Parrinello kiu ludas saksofonon en "Vidante la Pluvon" kaj Luis Scilingua kiu kantas en "Fidela Damo". Oni ankaŭ trovos voĉojn el diversaj personoj kiuj parolas dum la KD: Mara Causin, Franco Devizia, Gialma Causin kaj Silvana Meneghello.

Por aŭdi fragmentojn el la kantaĵoj, scii kiel aĉeti, vidi kelkajn videojn vi povas viziti:

<http://bizaralando.blogspot.com/>

## Dankesprimoj

SEK kore dankas la kunlaboron de: Alicia Aranda, Juanita Calaba de Schafheutle, Carolina Quintana, Berna Morzán kaj Tony Stacul, pro ĝia financa apogo por la disvastigo de SEK-Bulteno.

## SEK-Bulteno N° 26; Mayo-Agosto 2009 [2]

Órgano Oficial del Club Saenzpeñense de Esperanto

Calles 119 y 122, H3700FTT Pres. R. Sáenz Peña, Chaco, Argentina

**Redacción: Rubén T. Diaconu Tkachenco, E-mail: [rubendiaconu@yahoo.com.ar](mailto:rubendiaconu@yahoo.com.ar)**

Miembro y Delegado local de UEA (*Universala Esperanto-Asocio*), Holanda

**Colaboradores:** Tony Stacul; Emmanuel Maggiori



Sr/ra: